# Por mi, tio estis interveno de Dio

Atestoj de fido kompilita de

Erik Tantal

# „Por mi, tio estis interveno de Dio“

## - Atestoj de fido -

kompilita de

Erik Tantal

# Enhavo

Antaŭparolo....................................................................................5
La ludonanto....................................................................................6
La pekokonfeso................................................................................10
El mia studenta tempo.....................................................................13
Ĉio komenciĝis per trajno...............................................................17
La Biblio............................................................................................24
De dubo al fido.................................................................................27
Fido el la koro..................................................................................33
La Sankta Spirito..............................................................................39
La Ruaĥ.............................................................................................42
Ni kantas laŭte..................................................................................47
Kion vi respondus?..........................................................................49
Kolofono...........................................................................................52

# Antaŭparolo

Nuntempe ne estas memkompreneble raporti pri viaj propraj spertoj rilate al via kredo. Estas tute eble ke via kontraŭulo sulkas la frunton, ĉar neniu povas pruvi tion. Ĉu tio estis rekta interveno de Dio aŭ ĉu estis „nur” hazardo?

Mi kolektis diversajn rakontojn, kiujn kristanoj rakontis aŭ sendis pri ĉi tiu demando. Sed ne temas pri pruvi ion ajn. Nek temas pri la demando, kial en multaj kazoj Dio ŝajne tute ne intervenas. Tiu kompilaĵo simple celas pensigi kaj mirigi la leganton. Grandan dankon al ĉiuj rakontintoj!

Ĉiuj sekvantaj tekstoj estas grandskale protokoloj skribitaj laŭ memoro sen pretendo je 100% precizeco.

Grandan dankon al Theodor Wittenberger por la kontrolo kaj plibonigo de la teksto.

Nomoj kaj lokoj estas plejparte ŝanĝitaj.

# La ludonanto

Bernd rakontas pri la unua apartamento en Mölln, kiun li luis por sia familio:

Niaj ludonantoj estis la maljuna paro Ebeling. Ni loĝis en la unua etaĝo super ilin kaj ili posedis ankaŭ la najbaran domon. S-rino Ebeling estis tre afabla kaj ĉiam amika. Ŝia edzo ankaŭ bone akordis kun ni, sed bedaŭrinde tute ne kun sia edzino. Tion ni ofte rimarkis pro la vivsituacio. Krome, s-ro Ebeling estis tre cinika rilate al temoj kiel religio kaj la eklezio, kaj tio okazis tre rapide.

En la maloftaj okazoj, kiujn ni ne povis eviti, ni eniris tian konversacion, kaj devis tuj aŭskulti liajn malestimajn rimarkojn pri ĉio kio rilatas al eklezio kaj religio.

La apartamento mem estis kiel donaco por ni. Ni rajtis libere uzi la grandan ĝardenon kaj eĉ instali sablujon por niaj infanoj.

Unun vesperon en Novembro mi iomete promenis tra la ĝardeno. Dum tio mi intense pensis pri diversaj aferoj, speciale pri nia nove konstruata domo en Hamburgo. Ni ja esperis, ke tio estos finita antaŭ la fino de la jaro. Sed ekestis malfacilaĵoj.

Je tiu tago la filino de la familio Ebeling, kiu estis tie en vizito, eliris kaj komencis paroli kun mi. Ŝi diris, ke ŝia

patro estas grave malsana pro kancero. La kuracisto prognozis al ŝi, ke li certe ne transvivos la ses semajnojn ĝis Kristnasko.

Tiu prognozo tuŝis kaj malĝojigis min. Poste, kiam mi estis denove sola, mi daŭrigis mian promenon tra la ĝardeno. Mi komencis preĝi por s-ro Ebeling kaj precipe por lia edzino. Subite estis kvazaŭ iu dirus al mi: „Dum vi loĝos en la apartamento de la familio Ebeling, la maljunulo ne mortos“.

Tiu subita informo estis tute surpriza por mi kaj absolute nelogika laŭ la faktoj. Mi eĉ ne rakontis pri tio al mia edzino. Kion signifis tio kaj kial mi ricevis tiun nekredeblan informon? Mi havis suspekton, sed mi ne volis konfesi tion al mi mem. Sed ne eblis simple forgesi ĉion tion.

Intertempe estis problemoj pri la konstrulaboroj ĉe nia nova domo. La konstruo estis haltigita kaj ĉio daŭros pli longe. Tio ne estis problemo por s-rino Ebeling. Ŝi diris al ni: „Se vi volas, vi povas resti en la apartamento tiel longe kiel necese.“

Ni povis atendi sen ia premo kaj mi atendis Kristnaskon. Ĉu la informo estis ĝusta aŭ ĉu mi eraris pri tiu vespero? S-ro Ebeling ankoraŭ vivis dum Kristnasko, eĉ post la

Novjaro. Do, mi nun decidis rakonti al mia edzino ion pri mia tiama sperto en la ĝardeno.

„Tio estas klara“, ŝi opinias, „tio signifas, ke vi devas viziti lin kaj rakonti al li pri Dio!“ Jes, tio estis efektive mia unua suspekto, kiun mi tiom volis subpremi. „Neniam!“, mi pensis kaj diris al Dio: „Mi ne faros tion. Se vi volas, ke mi parolu kun li, tiam vi devas krei la okazon por tio.“

Pasis Februaro kaj Marto kaj s-ro Ebeling ankoraŭ vivis. Je la komenco de Aprilo mi devis iri al la familio Ebeling pro iu fakturo. S-ro Ebeling kuŝis malsane en sia lito portante blankan nokto-ĉemizon. Lia edzino sidis apud li. Mi apenaŭ finis la temon pri la fakturo kiam li startis. S-ro Ebeling komencis sian grumbladon. Li kritikis la loĝantojn de la najbara domo, kiuj estas islamanoj kaj ĉiam plendas, ke mono mankas al ili. Sed subite ili havas monon por la vojaĝo al Mekao kvankam la infanoj estis en malfacila situacio. Kaj li plendis pri la eklezioj, kiuj estas tiel riĉaj kaj ĉiuj tie estas hipokrituloj kaj pri la Papo kaj tiel plu.

Kiam li paŭzis mi komencis respondi al li per la Evangelio. Mi diris al li, ke pro Jesuo ĉio estas tute malsama ol tio, kion lia kritiko pri religia konduto sugestis. Mi diris al li, ke Dio venis al ni en Jesuo, por ke

ni estu liberaj de timo, de necerteco kaj de strebado al la favoro de Dio per religiaj devigoj. Li donis al ni sian amon kaj pagis per sia vivo por niaj pekoj, por ke ni finfine havu pacon kun Dio.

Mi ne scias kiujn aliajn detalojn mi diris, sed s-rino Ebeling kapjesis al ĉio kion mi diris al li. Je la fino, kiam mi forlasis la apartamenton, ŝi dankis min elkore. S-ro Ebeling ŝajne estis nun iel tre pacema, ĉiukaze, li ne kontraŭdiris.

Nia domkonstruado prokrastiĝis pli kaj pli, sed je la fino de junio nia domo estis finfine preta kaj ni povis translokiĝi. Unu semajno post nia translokiĝo ni ricevis la novaĵon, ke nia antaŭa ludonanto forpasis.

# La pekokonfeso

Jens rakontas pri la sekvanta travivaĵo, kiun li spertis dum junulara tendaro:

Estante 20-jaraĝa, mi laboris en junulara tendejo de nia komunumo. La semajno estis destinata al tiuj, kiuj ĵus ricevis konfirmacion, kaj ankaŭ al pli maljunaj junuloj. La traktita temo profunde kortuŝis la gejunulojn. Tial kelkaj el ili decidis fari paŝon al kredo. Tiel estis ankaŭ la kazo kun Ulf.

Li volis ordigi ĉion en sia juna vivo – li estis 15!  – . Tial li petis de mi konversacion por fari pekokonfeson. Ni sidiĝis en la ĝardeno de la junulara centro, kie ni povis interparoli trankvile.

Ulf raportis, ke li ŝtelis de multaj homoj, inkluzive de lia patrino kaj aliaj membroj de la familio, sed ankaŭ de tute fremdaj homoj, kiam estis oportuno. Kiam li ĉesis paroli, mi volis esprimi pardonon en la nomo de Jesuo, kiel mi estis instruita. Sed subite la sekvanta penso fulmis tra mia kapo:

„Ja ankaŭ vi ŝtelis!“,  mi rememorigis min.

Tio venis por mi neatendite, sed estis la vero: Antaŭ pli ol dek jaroj mi estis lernanto kaj ne redonis trovitan ludilon al lernantino el alia klaso, kvankam ŝi petis min.

Anstataŭe ŝi ricevis aĉan rimarkon de mi. Ĝuste en tiu momento mi rememoris la situacion, kiun mi jam delonge forpuŝis. Kio nun?

Mi daŭrigis la konversacion, mi esprimis al li la pardonon de Dio kaj admonis lin reordigi la damaĝojn, kiujn li faris. Tion li volis, sed en kelkaj kazoj tio ne eblis, ĉar li ne plu havis kontakton al kelkaj aŭ eĉ ne konis ilin. Do ni preĝis kune, ke Dio donu al li ŝancojn reordigi la malbonajn farojn.

Kiam Ulf foriris trankviligite, mi restis deprimita. Estis klare por mi: „Se vi ne faros la saman, kion mi ĵus sugestis al Ulf, vi neniam povos servi iun ajn sammaniere. Vi tiam perdos la spiritan aŭtoritaton.“

Do, mi preĝis, ke Dio donu al mi la ŝancon por peti pardonon kaj rebonigi la aferon, ĉar mi ne sciis kie la lernantino intertempe vivas. Mi nur memoris ke ŝia familio ne plu estas ĉi tie. Mi fakte sciis nenion, nur ŝian nomon. Mi ankaŭ ne atendis ion.

Ankoraŭ en la samaj someraj ferioj mi ŝoforis mian patrinon al la najbara urbeto al la kuracisto. Mi promenis tra la stratoj kaj poste tra la granda vendejo. Subite mi vidis junan virinon, kiun mi tuj rekonis kiel la personon, de kiu mi ŝtelis – post tiom da tempo!

Voĉo en mi diris laŭte: „Tie ŝi estas!“

Mi respondis: „Sed ŝi ne estas sola“, ĉar evidente ŝi venis kun amiko.

En tiu momento mi aŭdis lin: „Ni renkontiĝos ĉe la aŭto.“

Post tiam li foriris kaj la voĉo en mi diris: „Nun ŝi estas sola.“

Mi sekvis la junulinon al la rulŝtuparo, ĉar mi ne povis simple foriri. En la supra etaĝo mi alparolis ŝin. Mi prezentis min al ŝi kaj rakontis la historion, kiun ŝi jam delonge forgesis. Mi ankaŭ klarigis al ŝi kial mi parolis kun ŝi kaj ŝi pardonis min. Kompenson ŝi ne postulis, sed ŝi miris pri tiu stranga travivaĵo. Tiam ŝi diris al mi, ke ŝi loĝas en fora urbo kaj venis ĉi tien nur por ferii.

Post nia adiaŭo mi prenis mian patrinon de la kuracistejo. Mi lernis ke estas bone, preni Dion kaj la proprajn preĝojn tre serioze, ĉar kun Li ĉio eblas – kiel oni legas en la Skriboj.

# El mia studenta tempo

Paul havas tute alian opinion pri tio:

Por mi ĉiam estis klare ke devas esti Dio. Sed kompreneble ne tiu maljunulo kun blanka barbo sidanta sur la nuboj.

Ĝenerale mi havas problemojn imagi Dion, kiu persone povas komuniki kun ĉiu homo. Tial mi havas malfacilaĵojn preĝi tiel kiel multaj kredantoj faras. Mi simple ne povas fari tion.

Por mi la ideo havas sencon, ke la tuta mondo kun ĉiuj mirindaj kreaĵoj estis kreita de Dio. Kiel tio okazis, kompreneble, ne estas klare por mi. Certe ne simple per premo sur butono. Ĉio evoluis dum la tempo kaj obeis tre specialajn leĝojn de la naturo.

Laŭ mia opinio tiuj leĝoj havas dian kialon. Sen ili en la mondo ne ekzistus fiziko, kemio kaj biologio. Scienca esploro senĉese trovas novajn, mirindajn fenomenojn. Certe la homoj volas atingi la fundon de la planoj kaj receptoj de Dio. En kelkaj kazoj ili jam sukcesis. La rezulto estas la teknologia progreso.

Se tia Dio estas la kialo por ĉio, kio ekzistas, mi ne povas imagi, ke mi devas paroli al li persone. Li kaptus ĉiun de miaj pensoj jam antaŭ ol mi malfermas la buŝon.

Kaj mi neniam ricevis voĉan mesaĝon rekte de Dio. Aliaj raportis pri tiaj fenomenoj. Povas ja esti, ke ili efektive rimarkis tion. Eble ili havas specialan draton, antenon, kiu ebligas al ili ricevi tiajn mesaĝojn. Tial estas klare al ili, ke Dio rekte intervenis en iliajn vivojn.

La sekvantaj spertoj, pri kiuj mi volas raporti ĉi tie, eble inkluzivas tiajn intervenojn.

Okazis antaŭ longa tempo. Mi estis studento kaj veturis per mia nova Bismarck-biciklo. Ĝi havis eĉ kluĉilon por tri rapidumoj. Kaj subite mi devis bremsi je granda kruciĝo, ĉar la trafiklumo estis ruĝa.

Mi atendis senpacience la verdan signalon kaj tiam ekbiciklis per maksimuma rapideco. Subite meze de la kruciĝo veturilo baris al mi mian vojon. La ŝoforo evidente ne atentis sian haltsignalon. Tial mi devis bremsi denove. Ĉi-foje ne nur per pedalo, sed per uzo de la manbremsoj. Normale mi ne uzas ilin. Sed nun.

Mia tuta biciklo faris transkapiĝon, kune kun mi. Mia verda fazo finiĝis kaj la aliaj atendantaj aŭtoj ekveturis nun. Tial mi devis forlasi la mezon de la kruciĝo kiel eble plej rapide. Kaj tion mi faris. Estis neniu vundo. Ankaŭ la biciklo ne estis damaĝita. Mi nur denove sidiĝis ĝuste sur mia sidilo kaj komencis pedali.

Eĉ hodiaŭ mi ne scias, kial nenio okazis al mi. Mi povis daŭrigi mian vojon al la universitato kiel normale.

Ĉu tio estis interveno de Dio, kiu savis min? Aŭ ĉu nur bonŝanco? Ĉiukaze, kompreneble mi estas dankema por tio, sed kiel mi povus doni dankon al la hazardo?

Mi ankaŭ daŭre pensas reen al alia sperto.

Mi estis sanitarista helpanto en Germana armeo. Tial mi rajtis labori kiel flegisto en maljunulejo dum la studentaj ferioj.

Normale mi iris de sekcio al sekcio kune kun sperta kolego. Tie mi povis fari min utila per simplaj taskoj.

Dum tiu tempo pluraj viroj aŭ virinoj estis loĝigitaj en unu ĉambro. Ili kutime ĝojis kiam ni eniris. Mia kolego ĉiam provis disvastigi bonan humoron. Li estis iama masonisto, lerta fari la necesan laboron. Eĉ la ĉefa flegistino estis feliĉa, kiam ni venis. Pro mia korpograndeco mi povis bone helpi fiksi la kurtenojn al la fenestroj.

Kelkaj de la maljunuloj tamen estis tre grumblemaj. Mi ankoraŭ memoras virinon, kiu sidis rigide kaj maltrankvile en sia lito. Ŝi firme tenis sian rozkoloran trikitan jakon en siaj manoj kaj multe plendis, ĉar ĉio estis forprenita de ŝi. Kompreneble, mi komprenis tion.

Ĉiu loĝanto de la hejmo nur havis malgrandan ŝrankon. Tie neniam estis sufiĉe da spaco por ĉiuj personaj aĵoj.

En alia ĉambro ni zorgis pri maljuna virino, pri kiu mi tre kompatis. Ŝi daŭre devas kuŝi en sia lito. Krome ŝi ne povis paroli. Sed mi neniam forgesos la esprimon kaj brilon en ŝiaj okuloj. Tie estis neniom da amareco pri ŝia mizera sorto. La virino simple radiis en maniero, kiu nur eblas en plena feliĉo kaj paco.

De kie aŭ de kiu tiu virino ricevis la forton por fari tion en sia situacio? Tio estis io, kio kortuŝis min profunde.

# Ĉio komenciĝis per trajno

Brigitte komencis sian historion kun travivaĵo, pri kiu ŝia patrino rakontis al ŝi:

Mi tiam estis ĉirkaŭ sep monatojn aĝa. Estis la tempo ĉe la fino de la Dua Mondmilito. Ni loĝis en Silezio. Sed estis jam klare, ke ni ne povis resti tie pli longe. Polaj oficistoj ofertis al mia patrino du eblecojn. Aŭ resti ĉi tie sub la kondiĉo nur paroli la polan lingvon aŭ iri okcidenten. Mia patrino decidis fuĝi kune kun du el miaj onklinoj. Unu onklino ankaŭ havis etan bebon, kiu estis proksimume en mia aĝo.

La tri virinoj kaj la du beboj eniris la trajnon kiu veturis okcidenten. Estis longa vojaĝo. Subite la trajno haltis sur la malfermita vojo. La personaro informis nin ke ni havos duhoran halton. La lokomotivo bezonis replenigon de karborezervoj.

Mia patrino kaj la du virinoj rigardis ĉirkaŭen kaj vidis kelkajn forlasitajn domojn rekte apud la relvojo. Ili volis serĉi ion por manĝi kaj rapide ekiris. Estis ja ankoraŭ duhora halto.

Mia eta kuzo estis portita sur la korpo de sia patrino. Mi restis kuŝanta en la infanĉaro, ĉar mi ĵus ekdormis, tiel

profunde, ke neniu volis veki min. Krome, restis ja ankoraŭ du horoj ĝis la foriro.

Sed tuj post mia patrino kaj la onklinoj eniris la unuan domon, ili subite aŭdis la fajfilon. Kontraŭe al la antaŭa informo, la trajno nun ekmoviĝis denove. La virinoj kuris kiel eble plej rapide, sed ili nur vidis la lumojn de la lasta vagono.

Dume tio mi daŭre dormis trankvile en mia infanĉaro dum mia patrino kaj onklinoj ploris pro malespero.

Post nelonge, drezino, movata per nur unu viro, alproksimiĝis. Mia patrino, la onklinoj kaj mia eta kuzo ricevis la permeson kunveturi kaj tiel sekvis la trajnon. Tio estis ege malfacila tasko por la viro. Per ĉiuj siaj fortoj li sukcesis atingi la trajnon, kiu dume devis halti denove. Do, fine mia patrino povis brakumi min feliĉe.

Ĉar mi ja ne rimarkis ĉion, tial mia patrino rakontis tiun historion plurfoje poste.

Sed post tio estis alia okazaĵo. Dum tiu tempo la homoj, kiuj fuĝis, ofte helpis unu la alian. Kaj nekonata virino donacis al mia patrino malgrandan glason da mielo. Kompreneble oni ne rajtas doni mielon al beboj. En maloftaj kazoj ĉi tio povas ja esti vivdanĝera. Sed mia patrino ne sciis tion kaj donis al mi ion.

Oni rakontis al mi, ke post mallonga tempo mia haŭtkoloro terure ŝanĝiĝis al blua. Kaj mi devis multfoje vomi.

Ĉi tio estis evidente alergia reakcio. Neniu sciis kion fari. Sed venis virino kiu verŝis sur min plenan sitelon da akvo. Tio helpis. La blua koloro malaperis, mi resaniĝis kaj ne havis pliajn problemojn.

Post kelkaj jaroj mia patro revenis el la milito. Nia familio fine trovis apartamenton en eta urbo en Ŝlesvig-Holstino. Mi finis mian kvaran klason en la lernejo kaj deziris iri al la gimnazio. Sed la familio ne havis sufiĉe da mono por tio. Tial mi restis en mezlernejo. Kiel mi amus lerni pli da fremdaj lingvoj!

Tiun mankon mi parte kompensis kun mia angla korespondamikino. Mi estis invitita viziti ŝin en Anglio dum unu monato. Miaj gepatroj permesis al mi vojaĝi sola per trajno kaj pramo kvankam mi nur estis dek-kvinjara.

Mia gastigantaj gepatroj estis tre afablaj, ili akceptis min je la stacidomo. Ili estis anoj de Gideono, kiuj estas piaj kristanoj. Ili multe preĝis. Mi ne sciis tion de mia familio.

Je la tago de mia forveturo, mia gastiganta patro donacis al mi etan biblion kaj demandis min, ĉu mi volas dediĉi

mian vivon al Jesuo (Won't you give your life to Jesus?) . Se jes, mi estis petita konfirmi tion per subskribo en la libro.

Mi tute ne komprenis tion tiutempe. Sed mi faris ĝin pro ĝentileco. Honeste dirite ne pro mia kredo. Poste oni donis al mi la konsilon kontakti junularan grupon en Germanio.

Tie mi renkontis Tomason, agrablan junulon, kiu multe rakontis al mi pri Jesuo. Tamen mi estis iomete seniluziigita, ĉar mi atendis ke la junulara grupo ofertos multe pli da amuzaj aferoj. Mi fine forlasis la grupon kaj tute perdis la kontakton kun Tomaso.

Intertempe miaj gepatroj trovis por mi trejnan postenon ĉe san-sekura asocio. Mi devis labori tie dum mia provperiodo. Sed mi tie ne estis kontenta. Dum la tuta tago mi devis fari la aĉetojn por miaj kolegoj kaj porti la leterojn al la poŝtoficejo. Mi lernis nenion. Feliĉe ke mia patrino trovis alian kompanion. Tie mi ankaŭ povis profiti de miaj bonaj anglaj kapabloj.

Post tio mi partoprenis kurson pri kredo ĉe preĝejo. Tio pensigis min multe. Iun tagon estis kvazaŭ skvamoj defalis de miaj okuloj. Kun larmoj en miaj okuloj mi konstatis, ke ĉio, kio okazis al mi ĝis nun, povas esti klarigata nur per la interveno de Dio.

Ekde tiam mi konfesis mian fidon al Jesuo Kristo. Poste okazis multaj aliaj aferoj, kiujn mi povas kompreni nur kiel interveno de Dio.

Ĉe evento por virinoj kiu okazis en preĝejo, kuŝis sur ĉiu tablo eta karto kun biblia verso por ĉiu partoprenanto. Mi trovis la jenan: „Jes, mi restarigos vian sanon kaj resanigos viajn vundojn.” (Jeremia 30)

Sed mi povis fari nenion per tio, ĉar mi ja tute ne sentis min malsana.

Jarojn poste mi estis kuracita en hospitalo pro malsano de la tiroido. Post la operacio mi devis ankoraŭ kuŝi en apuda ĉambro ĝis la forpaso de la anestezo. Subite mi havis terurajn problemojn por spirado. La kuracistoj devas fari trakeotomion. Poste mi ne plu povis paroli, sed mi povis spiri denove.

Mi dankis Dion kaj denove atendis en mia hospitala lito. Post kelkaj semajnoj alia kuracisto ekzamenis min.

Mi pensis, ke io stranga okazis. Li daŭre grumblis dum la ekzamenado sed mi ne komprenis. Tiam oni donis al mi koverton, kiun mi devis porti al mia hospitala sekcio.

En la lifto mi rigardis la paperojn kaj eltrovis ke evidente io kaŭzis fiaskon je mia operacio. Vere, tie estis legebla, ke mi povus sufoki kaj morti du horojn poste. Denove mi

dankis pro la gvido de Dio. En la hospitalo mi ne diris ion. Ili ja ĉiuj vere provis helpi min. Mia tiama kuracisto verŝajne alproksimiĝis tro dense al la koncernaj nervoj dum la operacio. Poste li eĉ petis pardonon por sia eraro.

En la hospitalo estis eta diservo en la hospitalo kun unu partoprenanto, kiu estis mi. Poste mi estis irigita hejmen el la malsanulejo. Estis Pentekosto kaj mi ĉeestis diservon en granda kirko. Tie temis pri resanigo. Je la fino oni invitis nin iri antaŭen por preĝi. Virino, kiu helpis dum la diservo, metis sian manon sur min dirante:

„Jesuo, bonvolu resanigi mian fratinon!“.

Kaj estis vere, post kelkaj tagoj mi povis denove paroli iomete. Dum la sekvanta kuraca traktado montriĝis ke unu voĉkordo ankoraŭ estis paralizita, sed la alia denove funkciis. Por mi, ĉio tio estis signoj de la helpo de Dio. Post unu jaro, mi eĉ povis frue retiriĝi pro mia malsano. Mi tiam okupiĝis pri laboro kun senhejmuloj kiu estis organizita per eklezia komunumo.

En preĝejo estis aranĝo dum kiu oni demandis nin pri eblaj talentoj kiuj taŭgus por specialaj taskoj.

Tio ne estis tiom grava por mi, ĉar mi ja jam engaĝiĝis en laboro por senhejmuloj. Sed la pastro demandis min tamen. Subite mi aŭdis min mem diri:

„Mi volas okupiĝi pri laboro kun prizonuloj.“

Mi ne scias, kial mi diris tion. Kaj la pastro respondis:

„Jes, Sinjoro, se Brigitte faru tion, donu al ŝi signon!“

Sed evidente ne estis facile akcepti tiun taskon. Tial tio ne plu estis diskutita.

Sur mia hejmveturado mi estis en la metroo. Tie mi renkontis junan viron, kiu kaptis mian atenton, ĉar li fumis en la vagono. Sed mi diris nenion al li.

Subite li staris antaŭ mi kaj montris al mi sian ŝvelintan manon. Mi ne sciis kial li kontaktis min. Sed mi ofertis preĝi por li. Li permesis tion.

Montriĝis, ke li estis nuntempe en kelktaga forpermeso de malliberejo. Li ankoraŭ devis trapasi restantan tempon de la puno. Je la sekva haltejo li forlasis la vagonon. Mi neniam revidis lin. Sed por mi ŝajnis ke tio estis la signo, kiun mi bezonis por mia laboro en malliberejo.

Kaj finfine tio estis permesita por mi. Iun tagon amikino telefonis kaj informis min, ke oni serĉas volontulojn por deĵori en malliberejo.

Post speciala kurso, mi nun vizitas homojn, kiuj estas en malliberejo. Mi ĝuas la servon ĉiun duan semajnon kune kun geedza paro.

# La Biblio

Roberto, el Nordameriko, parolas pri sia kredo:

Mi kreskis sen patro, kun mia patrino kaj parte kun mia avino. Tie tute ne ekzistis Jesuo. Mi nur iris al preĝejo eble unu aŭ du fojojn, al funebra ceremonio aŭ geedziĝo.

Kiam mi spertis mian unuan “vojaĝon” kun LSD kiel adoleskanto, mi disvolvis tiun ege fortan senton de unueco kun ĉiuj estaĵoj kaj la tero. Eĉ hodiaŭ, kiam mi promenas, mi foje estas emocie superregata de la beleco, kiun Dio kreis.

Dum tiu tempo mi havis amikon, kiu demandis min ĉu mi iam legis la Biblion. Mi neis kaj li diris ke mi devas legi la Novan Testamenton pri Jesuo. Do, mi faris kaj estis revelacio por mi. Kaj mi aŭdis de homoj, kiu faris nenion krom laŭdi Dion, tagon post tago, dum la tuta semajno.

Ni iris tien kaj povis vidi, ke ili vere laŭdis Dion tagon kaj nokton. Tio estis mirinda, same kiel en la libro de Agoj, ĉiuj estis unu.

La revelacio estis la maniero kiel kristanoj devas vivi, trovebla en la libro de „La Agoj de la Apostoloj“ el la Biblio. Vivi en komunumo, kunhavi ĉion, preĝi al Dio kune, helpi unu la alian, akcepti ĉiujn.

Mi tiam estis baptita en lago. Ili predikis rekte el la Biblio, nenio alia. Ili estis la Jesus Freaks, evangelia kristana movado, kiu startis sur la okcidenta marbordo de Usono en la malfruaj 1960 kaj fruaj 1970 jaroj. Ĝi ĉefe disvastiĝis en Nordameriko, Eŭropo, Mezameriko, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Dum la malfruaj 1980 jaroj la movado malaperis.

Do, iun tagon ni venis al iliaj domoj, kiujn ili nomis Domon Agape, Domon Amos ktp. Sed tie estis neniu. Kial? Kiu scias?

Poste mi revenis en miajn malnovajn kutimojn. Same kiel en la parabolo de la semanto. Pasis jaroj: Geedziĝo, infanoj, alkoholismo, eksedziĝo, tri foje traktado en malsanulejo, geedziĝo, kaj kompreneble laboro.

Do, antaŭ 15 jaroj mi vekiĝis je la mateno kun superforta deziro legi la Biblion. Tio estis unu el tiuj aferoj, kiujn mi absolute devis fari. Mia unua penso estis, ke Dio volis, ke mia rilato kun li fariĝu pura, ĉar mia tempo alproksimiĝis.

Tial mi komencis legi la Biblion ĉiun tagon, kiam ajn mi havis la ŝancon. Post unu monato mi komencis viziti la preĝejon. Mi eĉ deĵoris kiel akceptisto ĉe la enirpordo kaj partoprenis ekleziajn projektojn.

Mi legis la tutan Biblion 15-foje, ĉar mi legis ĝin ĉiun jaron. Mi scias nenion pri la religioj de la homoj kaj iliaj ritoj, festotagoj kiel Advento ktp. Sed mi konas la Biblion. Mi ankoraŭ legis ĝin ĉiutage. Kiam mi dividas mian ateston kun aliaj mi ĉiam diras:

„Tio ne estas mia ideo.“

Por mi tio signifas ke Dio/Jesuo/la Sankta Spirito regas mian vivon.

# De dubo al fido

Gerd rakontas sian historion:

Estis tempo kiam mi pensis: Mi povus ja nun pafi kuglon en mian kapon. Kompreneble mi ne volis fari tion, mi faris nur mian analizon de la vivo. Ĉu estas diferenco ĉu mi mortos nun aŭ post 60 jaroj? Je la fino ĉiuokaze ĉio finiĝos. Neniuj memoroj, neniu konscio, iam ne plu ekzistos nek mondo nek tempo. Lasi ion malantaŭe ankaŭ estas senutile. Do kio estas la senco daŭrigi vivi? Ni ĉiuj mortos – kaj tiam? Tiam venos nenio.

„Bonege, Gerd, Bonega kompreno. Noto B+.“

Tiel estis la komento de mia filozofi-instruistino pri mia kontribuo en la 11-a klaso. Ŝi estis entuziasma. Tiel mi tiam pensis. Racie, sobre, kaj la altnivela kurso pri fiziko estis tre interesa. Dio? Por mi li ne ekzistas. Tamen restis tiu pika sento: Io ne estas en ordo ĉi tie.

Homoj serĉas signifon, respondojn. Pli frue aŭ pli malfrue vi komencos pentri la mondon laŭ viaj deziroj, kiel Pipi Ŝtrumpolonga. Kaj poste oni desegnas eĉ Dion kiu konvenas al la propra mondkoncepto, Dion kiu devas adaptiĝi al ni.

Bonŝance ke la aferoj finiĝis alimaniere por mi.

Dio estas tie – ĉiam. Kaj la plej grava estas: Turnu vin al li. Tio estas libera volo. Turniĝi. Lasi ĉion iri. Fidi. Kredi. Kiu konfidas sin al Dio, tiu ricevos respondon. Al tiu estas montrita la vero.

Tiel komenciĝis mia historio.

Inter 2000 kaj 2001, mi pli kaj pli ofte parolis pri Dio kun mia samklasano Hanno. Li komencis legi la Biblion, li interesiĝis pri politiko, kaj kredis ke la Dio de la Biblio estis la sola vera – kaj ke Jesuo Kristo estas la filo de Dio. Mi provokis lin dirante: „Do Dio nun trafigu fulmon ĉi tien. Tiam ankaŭ mi kredas.“ Mi fariĝis laŭta – preskaŭ defia. Kompreneble, neniu fulmo trafis.

Aŭ ĉu estis io?

Ĉar Dio ekokupis pli kaj pli spacon en miaj pensoj. Samtempe malfermiĝis por mi rigardo malantaŭ la kulisojn de la mondo – al kuntekstoj, personoj, potencosistemoj. Multaj aferoj aperis subite kontraŭdira, nekompleta, pridubinda. Mi komencis demandi. Eĉ kiam mi ne volis konfesi tion al Hanno, mi ja estis tro fiera, mi iĝis scivolema – kaj iam eĉ fascinita.

En 2001 kiam mi laboris dum tri monatoj en pakaĵfirmao ĉar mi volis gajni monon por vojaĝo al Aŭstralio, mi

renkontis kun Justus. Li estis jam pli maljuna, sed mi povis paroli alimaniere ol mi povis kun Hanno.

Kaj tial mi ankoraŭ ne devis konsenti kun Hanno, ke Dio ja ekzistas. Mi ankoraŭ estis iomete tro fiera. Ĉiuokaze la atako 9/11 ĵus okazis kaj Justus parolis kun kolegoj pri aferoj, kiuj tiel ne troviĝis en gazetoj. Mi fariĝis atentema. En paŭzo mi vidis lin kun Biblio – tio impresis min. Ni multe parolis, kaj estis li, kun kiu mi aĉetis mian unuan Biblion. Poste mi neniam plu vidis lin.

Mi flugis al Aŭstralio kun ĉi tiu unua Biblio.

Tie, malproksime de mia patrujo, mi vere komencis kredi. Mi komencis legi la Biblion – kvankam komence moskitoj kaj aliaj insektoj, grandaj kaj malgrandaj skaraboj, ĝenis min. Mi devis daŭre haltigi la legadon, ĉar ili sidis sur la paĝoj. Sed tiam mi sukcesis. Mi legis preskaŭ la tutan Novan Testamenton kaj komencis vere konatiĝi kun Jesuo Kristo. Mi kredis. Kaj mi entuziasme rakontis pri tio.

Tie, kun mia plej bona amiko Cedric, mi ankaŭ parolis multe pri la Biblio – sed ĉifoje estis mi, kiu defendis Lin. Estis multaj momentoj, kiam mi sentis la ĉeeston de Dio. Ekzemple, kiam mi elĉerpis mian monon post du monatoj. Mi volis ja resti en Aŭstralio dum tuta jaro. Mi estis malespera kaj serĉis laboron en la urbo – sen

sukceso. Survoje reen, mi unuafoje serioze preĝis por helpo.

Mi apenaŭ eliris el la buso kaj tuj renkontis miajn kunloĝantojn – kaj Harry spontanee proponis al mi laboreblecon sur konstruejo. Tio fariĝis ses monatoj da bone pagita laboro, kiu eĉ permesis al mi aĉeti aŭton. Ĝi estis malfacila laboro, sed bone pagita, kaj ĝi estis bonega tempo. Kaj Cedric laboris ankaŭ tie.

Alia ekzemplo estas Edward, usonano, kiu loĝas kun ni en la  gastejo. Li estis prirabita. Tiutempe mi ne havis laboron, ĉar mi ĵus alvenis. Kaj mi mem apenaŭ havis monon – eble 300 aŭstraliajn dolarojn – ĉiuokaze mi donis al li 100 de tiuj. Mi diris al li: Se mi mem bezonos ion, Dio zorgos pri mi. Kaj tiel okazis.

Mi lernis konfidi Dion.

Iam en Aŭstralio mi akceptis Jesuon Kriston kiel mian Sinjoron. Mi petis lin pri pardono – Kaj li pardonis min. Mi metis mian vivon en liajn manojn. Ĉar li releviĝis, mi ankaŭ releviĝis. Mi ankaŭ estas savita – kiel perdita filo, denove akceptita de la patro. Tra la jaroj mi fariĝis pli kaj pli konscia pri ĉi tiu graco, ĉi tiu amo, ĉi tiu kompato. Kaj ju pli oni fidas, des pli Dio revelacias.

Hodiaŭ mi vidas kun zorgo, ke multaj homoj volas misprezenti la Vorton de Dio. Ili volas ke Dio adaptiĝu al la spirito de la tempo. Sed la Vorto de Dio estas vivanta, ĉar Jesuo vivas – ne ĉar ĝi estas ŝanĝema. La vero de Dio estas sendependa de la tempo. Mi maltrankvilas ĉar tiom da homoj perdiĝas. Dio ne estos perdita, sed la homo estos.

Speciala signifa momento estis mia bapto – ĝi estis por mi persone tre speciala momento, kvankam ne decida por mia savo.

Estis 2014 aŭ 2015. Mi ĵus legis la Epistolon al la Romanoj kaj vere komprenis, kion signifas, ke fido savas – kaj kia graco kuŝas en ĝi. La bapto okazis en la rivero Elbo. La kuzo de Hanno spontanee demandis min, ĉu mi volas esti baptita kune kun lia frato Marko. Mi konsentis – Hanno devus bapti min.

Sed mi malfruiĝis. Mi estis kontrolita sen bileto en la metroo – eĉ la federacia polico venis.

Mi pensis: Bonege. Vi volas esti baptita kaj estas kaptita rajdante la trajnon sen bileto. Mi hontis – kaj samtempe komencis en mia menso juĝi pri aliaj, kiuj eventuale jam ne atendis min multe pli longe.

Sed ili atendis. Hanno atendis.

Tre precize mi memoras, kiel mi iris al la akvo. Tie staris Hanno, la Biblio en la mano. Kiam mi alproksimiĝis lin, li nur skuis la kapon – ne por juĝi, sed kiel iu kiu volas diri: Vi faris eraron, jes. Sed Dio pardonas vin. Vi ne meritas tion – sed li amas vin.

Tiun miksaĵon de honto kaj ĝojo mi povas nur malfacile priskribi. Mi rajtis esti baptita. Mi povis konfesi ke Jesuo Kristo estas mia savanto.

Nur jarojn poste mi eĉ pli profunde komprenis: Ili havus ĉiun kialon ne atendi min. Mi ne estis tie, mi ŝtelis, mi malfruis. Sed Hanno atendis – same kiel Dio atendas. Ne ĉar mi meritus tion. Sed pro graco. Pro amo.

Ĉar la salajro de la peko estas la morto. Ne ĉar Dio volas puni – sed ĉar estas la justa juĝo. La infero ne estas loko, kiun Dio volas, sed la sekvo de la peko. Same kiel malliberejo estas la sekvo de ŝtelo. La sola vojo eskapi el tiu loko estas neniam eniri tien.

Kaj la sola vojo estas Jesuo Kristo.

„Mi estas la vojo, la vero kaj la vivo.“

Amen.

# Fido el la koro

Ĉi tie skribas Marvin:

La origino de mia kredo kuŝas en mia frua infanaĝo. Ĉiuj de la membroj de mia familio estis baptitaj, konfirmitaj kaj geedziĝintaj en preĝejo. Sed kun escepto de mia patrino kaj ŝia patrino, tio estis verŝajne pro kutimo.

Mia patrino kaj avino, aliflanke estis vere religiemaj. Mia avino male al mia patrino, ankaŭ regule iris al la preĝejo. Sed en la familio, kie mi kreskis, ne okazis regulaj vizitoj de la preĝejo aŭ preĝado hejme.

Sed, kiam mi estis malgranda aŭ tre juna, mia patrino preĝis kun mi ĉiun vesperon „Müde bin ich, geh zur Ruh" (Laca mi estas, iru ripozi) aŭ kantis „Weißt du, wie viel Sternlein stehen" (Ĉu vi konas, kiom da steletoj estas?). Kaj ŝi ankaŭ parolis pri Dio en ĉiutaga vivo, ekzemple „La bona Dio vidas ĉion", kio ne ĉiam utilas por adoleskantoj.

Ekde tiuj fruaj tempoj kun preĝoj por infanoj mi disvolvis tion, kion mi nomas „fido el la koro". Mi neniam perdis tion.

Do, mi havas ion kiel „infanan kredon“ kiu ne estas afekciita aŭ eĉ malaperigita per mia racio. „Veraj“ kristanoj (en la senso de la institucia eklezio) povus probable nomi min nekredanto aŭ marki min herezulo.

Mi pridubas la skribaĵon, foje eĉ la rabenajn interpretadojn. Kaj mi traktas sciencajn malkovrojn de teologoj, historiistoj kaj arkeologoj rilate al la juda, kristana kaj la tiel nomata pagana historio.

Ofte mi trovas la tekstojn el la Biblio en „malnova“ lingvo (ĝis la 19-a jarcento). Mi konsideras, ke la hebreaj kaj grekaj originaloj estas pli kolorriĉaj kaj potencaj ol la nunaj tekstoj.

Tamen mi pensas ke la plej granda parto estas historie malpreciza kaj elpensita kaj prezentita de dogmaj kredantoj en la spirito de kredo kaj misia volo. Tamen tio ne limigas nek mian „infanan kredon“ nek „elkoran kredon“.

Male, mi trovas la diskuton pri la filozofiaj fundamentoj, la teologiaj interkonsentoj aŭ similecoj kun aliaj, pli fruaj religioj kaj kredoj nekredeble riĉiga. Tio validas ankaŭ por la malsamaj fruaj kristanaj vidpunktoj. Mi pensas ĉi tie precipe pri Arianismo (esenca simileco anstataŭ esenca egaleco).

Multon, eĉ tio, kio venas rekte el la skribaĵoj, mi konsideras esti plena de granda beleco kaj komprenas ĝin kiel omaĝon. Ekzemple la vorto „Elohim” (pluralo, laŭvorte „dioj“) anstataŭ „Eloha“ (singularo, t.e. „Dio“).

Elohim (pluralo), ne Eloha, diras: Ni kreu (pluralo) homon laŭ nia bildo. Por mi la plej bona klarigo por la uzo de la pluralo estas, ke ne eblas, ke la nekomprenebla diverseco de Dio povas esti esprimita en singularo.

Mi nomis mian kredon „infana“, ĉar mi ofte vidas belecon en rusta najlo kuŝanta en flako, same kiel infano povas vidi la buntan brileton, kiam radio de la suno trafas ĝin.

Mi povas rekoni la manskribon de Dio en ĉio, kio estas: la kosmo, mineraloj, plantoj, bestoj kaj homoj, kaj la ĉeesto kaj lumo de Dio en vivantaj estaĵoj. Kaj tial mi dankas kaj laŭdas Dion pro tio, eĉ en tiel nomataj etaj aŭ ŝajne negravaj aferoj.

Sendepende ĉu tio ŝajne estas stranga aŭ ne, tiu vidmaniero estas por mi daŭra fonto* de ĝojo kaj feliĉo, same kiel la sekureco de senti sin ligita al la kreaĵo de Dio.

* Fonto – ankaŭ bele: „brecha“ = fonto estas etimologia baza formo de la hebrea „baruch“. Tio inkluzivas sankta, benata, laŭdata: Por mi oni povas kompreni tion ankaŭ ke Dio estas la fonto de ĉia estaĵo kaj estas sankta. Baruch hashem Adonai = Laŭdata estas la nomo de la Eternulo.

En mia vivo mi ĉiam, plej malfrue en retrorigardo, havis la sperton kaj ekkomprenis, ke Dio ĉiam estas kun mi. Malgraŭ  malfacilaj situacioj kiel morto, grava malsano aŭ disiĝo, eĉ se mi ne ĉiam rimarkis ĝin en tiuj situacioj.

Ekzemple, estis grava koratako, kiun mi travivis en junaĝo, kaj kiu kaŭzis neripareblan fizikan damaĝon. Sed sen tiu bato mi neniam renkontus mian delongan amatinon. Dankon al Dio!

Malfacilaĵoj, timoj kaj vundoj okazas en la vivo de ĉiu homo. Ĉi tio validas ankaŭ por mi. Sed mi ne volus maltrafi ion ajn. Ĉar tio estas la bazo de mia hodiaŭa ekzisto kaj la tuta amo kaj atento, kiun mi ricevis, kaj ankaŭ la bazo de la sento esti plejparte feliĉa kaj kontenta.

Mi ankaŭ ne estis libera de dependecoj, sed mi konsideras la fakton, ke mi povis ĉesi trinki alkoholon kaj fumi, kiel puran donacon de graco.

En la jaro 1989 mia patro mortis en sia lito pro pulma embolio. La kuracisto de la familio, kiu ekzamenis lin antaŭe, diagnozis ingvenan streĉiĝon. La krizo-kuracisto, kiu estis vokita poste, diris, ke li ne povis trovi la numeron de nia domo. Mia patro mortis kaj mi kriis: „Dio, mi malamas vin!“

Sed Dio ne kondamnis min pro tio, sed prefere restis kun mi, tenis min kaj donis al mi fortojn fari ĉion necesan kaj doni konsolon, kio finfine konsolis ankaŭ min.

Pensi pri la „justeco de Dio“ kondukus al neniu rezulto. Eĉ pensi pri la neebleco de plia kunesto sur tiu mondo estus sensenca kaj dolora.

En 1993 mi estis en komato dum ĉirkaŭ du semajnoj. La kaŭzo estis koratako, kiu ne estis rekonita ĝustatempe. Ĝi verŝajne okazis dum iu nokto antaŭa, kiam mi kuŝis en malsanuleja lito, kaj kondukis al senkonscio. Senkonscio kaj koratako ne estis rekonitaj ĝis la sekvanta mateno. Tial estis tro malfrue por fari korektojn per interveno. Do ekde tiam mi havas nur duonon de mia kora funkcio.

Post mi finfine ekvekiĝis en mia lito, mi ne povis leviĝi, sed mi povis rigardi eksteren tra la fenestro kuŝante. Kaj ŝajnis al mi ke mi povis vidi pli ol mian apudan ĉirkaŭaĵon.

Mi vidis pejzaĝon kiu realiĝis en la okuloj de mia menso. Ĝi aspektis kiel pejzaĝo de Dio – verda kaj vivanta, kvazaŭ nove kreita; kun herbejoj, arboj, arbustoj kaj belaj montoj en la fono – kaj ene de tio kaj en mi ne estis loko por doloro, timo pri mia estonteco aŭ mia sano.

Mi havis neniujn dezirojn. Estis simple la sento: Ĉio estas bona kaj restos tiel, negrave kio povus okazi.  Verŝajne oni povis diri, ke tio estis pro mensa malsano sub influo de medikamentoj, sed mi preferas mian version: Dio montris al mi kio estas ebla por li, speciale por ni homoj: Kompleta (interna) paco kaj absoluta libereco. Neniam antaŭe kaj neniam poste mi sentis min tiel libera. Vere estis kiel priskribis Hermann Hesse:„... Nur kiam vi rezignas ĉiun deziron / ne plu konas nek celon nek deziron / ne plu nomas feliĉon laŭnome / tiam la inundo de la eventoj / ne plu eniras vian koron / kaj via animo ripozas.“

## La Sankta Spirito

Andreas priskribas siajn spertojn ligitajn al lia kredo:

Miaj gepatroj estis kristanoj. Por ni la dimanĉa vizito al la diservo estis tute normala afero. Tial mi jam frue havis kontakton kun la junulara grupo de nia preĝejo.

Tie estis komforta teĉambro, en kiu ni povis pasigi multajn horojn de nia libertempo. Post kelka tempo estis mia konfirmacio. Ankaŭ nia geedziĝo estis festita en la preĝejo.

Mi apenaŭ pensis pri mia kredo en tiu tempo. Nur kiam en nia kirko preĝis pastoro kun karismo ĉio ŝanĝiĝis. Liaj predikoj foje povis daŭri pli ol unu kaj duono horon. Sed ili estis io aparta!

En la pasinteco, mi plejparte aŭskultis pli mallongajn predikojn. Kaj pleje, kiam oni poste demandis min pri la temo de la diservo, mi apenaŭ povis respondi. Mi simple rapide forgesis tion.

La predikoj de tiu karisma pastoro vere impresis min. Ili tre pensigis min.

Kvankam ili estis tiel longaj, mi povis memorigi la enhavon eĉ post pluraj tagoj. Ĉio vagadis ankoraŭ longe en mia kapo.

Iam poste mi havis travivaĵon en la metroo, pri kiu mi devis longe pripensi.

Maljuna, handikapa virino sidis en la sama vagono kun mi, rekte ĉe la kontraŭa flanko. Je la sekva haltejo ŝi luktis por atingi la pordon por eliri.

Mi fakte tute ne rimarkis ŝin. Verŝajne ĉar mi iomete dormis dum la longa veturado. Sed subite mi ekstaris kaj helpis ŝin forlasi la trajnovagonon. Ŝi dankis min.

Sed estis stranga situacio. Dum la tuta tempo mi sentis ke mi estis blokita sur mia sidloko. Mi havis la impreson, ke ne estis mi, kiu helpis la virinon. Tio estis kvazaŭ eliris el mi alia persono. Nur multe pli poste klariĝis, kiel mi povas kompreni tiun travivaĵon.

Post kelkaj jaroj mi kaj mia edzino translokiĝis al alia urboparto. Ni tie vizitis la lokan preĝejon. La kontakto al la nova paroĥo baldaŭ kondukis al mia kandidatiĝo por la preĝeja konsilantaro laŭ sugesto de la pastro. Li eĉ sukcesis konvinki min transpreni la gvidadon de la Biblia studgrupo, kvankam mi tute ne sentis, ke mi taŭgas por tio. Mi ja ne estis sufiĉe bona por prezenti imponajn

konceptojn al grupo. Tio signifas, ke ne estis facile por mi paroli spontanee kaj libere paroli antaŭ publiko.

Okazis kiel devis okazi. En unu de la kunsidoj estis faritaj multaj demandoj. Kaj al unu demando mi verdire ne sciis kiel reagi. Sed subite respondo eliris el mia buŝo. Mi ne povas memori ke mi iam antaŭe jam pensis pri tio, kion mi ĵus diris. Estis klare por mi, ke la Sankta Spirito gvidis min en tiu momento.

Simila travivaĵo okazis en doma biblia grupo. Ni traktis la temon „pardono“ kaj poste ni preĝis. Unu el la virinoj parolis pri sia iama turmentanto en la preĝo. Ŝi petis ke li ricevu la ĝustan verdikton dum la Tago de la Juĝo.

Nun mi aŭdis, kion mi mem diris en tiu momento. Laŭsence estis tiel: „Ni ja ĵus pardonis niajn malamikojn. Do, estas klare, ke neniu juĝo povas esti konsiderata por via turmentanto!“

Mi neniam antaŭe okupiĝis pri tia penso. Do, kiel tiu frazo povis eliri el mia buŝo?

Denove, tio estis por mi indiko, ke la Sankta Spirito gvidis min. Kaj tiel certe validas ankaŭ por mia travivaĵo kun la maljunulino en la metroo.

# La Ruaĥ

**Kiel mi venis al fido?**

Mia vivo neniam estis rekta linio. Kontraŭe, ĝi estis serpentsimila kaj mi havis nenion komunan kun la eklezio.

Kiam mi havis mian eniran kvalifikon por la  universitato de aplikataj sciencoj en mia poŝo, mi translokiĝis de vilaĝo al granda urbo. Tie komenciĝis mia profesia klerigado, kiu tute ne kontentigis min. Post unu jaro mi sciis, en ĉi tiu profesio mi ne maljuniĝos.

La solvo: Mi komencas universitatan studon! Laboro kiel instruisto estis la respondo al mia demando. Mia amikino diris: „Elektu Religion kiel fakon, tio estas facile studebla.“  – „Bone“, mi respondis, „sed kian duan fakon mi prenu? Mi ŝatas legadon, do, devas esti Germanaj Studoj. Jes, ĝuste!“ La plano estis fiksata, sed al mi mankis mia altlerneja diplomo kaj, ĉefe, la tempo en mia vivo.

Dum mia profesia klerigado mi vizitis ĉiuvespere la vesperan lernejon kaj akiris mian abituron, paralele al mia profesia trejnado. Post 15 testoj en la sama monato mi sukcesis:   Mi trapasis ambaŭ ekzamenojn! Tio ŝanĝis mian vivon.  De tiu momento mi sciis, ke mi atingas ion

ajn, se mi nur sufiĉe laboras. – Mia devizo en la vivo ĝis hodiaŭ. –

Mi studis kiel mi planis: Instruprofesio kun la fakoj de religio kaj germana lingvo. Estante pli maljuna ol la aliaj mi ne estis tipa studentino. Mi ekkonis la laboran mondon kaj jam ĉiam volis plilarĝigi mian horizonton.

Kaj tiel komenciĝis mia vojaĝo al la kredo.

Dum la unua semajno mi sidis en la seminario „Bibliaj studoj Malnova Testamento“ kaj la prelegantino instruis kun tiom da entuziasmo.

Mi ne havis ideon pri la Biblio, la eklezio, aŭ eĉ la kredo, kaj tamen mi ensorbis ĉiun solan vorton de la Malnova Testamento. La libroj de la Juĝistoj kaj de Samuel aparte ankoraŭ fascinas min hodiaŭ. Nova mondo kvazaŭ malfermiĝis al mi, kiel tiam, kiam mi estis en la vespera lernejo.

Mi soifis lerni pli, sed kion mi faru? Ĉu mi ŝanĝu mian studfakon al plena teologio kaj eĉ iĝi pastro iam? Kiel mi povus fariĝi pastro sen havi kristanan fonon aŭ esti ligita al la fido je Dio aŭ la eklezio?

En la sama semajno mi sidis kun tiuj demandoj en mia kapo en enkonduka diservo de la universitato. Amikino

trenis min ĉi tien. Mi ne vere volis, sed feliĉe tiu amikino persistis, ĉar tiu tago ŝanĝis mian vivon.

Mi sidis en tiu diservo neaŭskultante kaj pensadis pri mia estonteco. Ĉu mi povus esti teologo aŭ eĉ pastoro? Ĉu Dio vere ekzistas? Kiel mi rakontu pri iu Dio, kiam mi eĉ ne povas kompreni lin mem? Kaj tiam mi pensis: „Simple studu tion, kio plenumas vin! La cetero venos per si mem.“

Kaj en tiu eta momento de mia interna, tre mallaŭta klareco mi sentis spiron de vento ĉirkaŭ mi. Miaj haroj dancis tenere en la vento, mia dorso sentas sin varme kaj mia korpo estis malstreĉita, kvazaŭ ne estis delonge. Tio estis mirege bele kaj en tiu momento mi ne plu sentis timon aŭ dubon. Mi ne scias, de kie tiu venteto venis. Ĉiuj homoj sidis rigide sur la benkoj kaj aŭskultis. La pordoj estis fermitaj, neniu eniris aŭ eliris.

Mia analiza naturo kontrolis ĉiun eblecon. Estis neniu. Estis reale. Mi sentis tiun brizon ĉirkaŭ mi. Estis kvazaŭ la mondo haltus, ĉio ĉirkaŭ mi estis frostigita kaj nur mi estis ĉirkaŭita de tiu ventoblovo. Venteto, kiu donis al mi subtenon. Dum dek sekundoj: 10.9.8.7.6.5.4.3.2.1.0.

Mi ne scias de kie venis tiu spiro de vento kaj mi ankaŭ ne volas soni banale aŭ freneze, sed tiu venteto donis al mi forton kaj verŝajne, jes, mi firme kredas, ke tio estis la

Sankta Spirito. En la hebrea lingvo: רוּחַ Ruaĥ. Estis la Ruaĥ, kiun mi bezonis. Estis la momento, kiu montris al mi: Dio, kiu vidas min, ekzistas. Dio, kiu lasis min senti, ke li ĉeestas. Tiu, kiu resonas en mia vivo.

La sekvan tagon mi ŝanĝis mian studfakon. Anstataŭ instruistino mi iĝis plena teologino. Tiun decidon mi neniam bedaŭris.

Pro mia relative malfrua eniro en teologion per dua eduka vojo kaj mia fono, kiu estas tre malproksima de edukado kaj eklezio, mi ofte vidis teologiajn studojn el malsama perspektivo ol miaj kun-studantoj. Mi neniam prenis miajn studojn kiel memkompreneble, ĉar mi estis la unua persono en mia familio, kiu sekvis akademian karieron. Kaj mi ĉiam serĉis eblecojn por ligi teorion kun praktiko kaj integri ĉiutagajn spertojn de la homoj en mian teologian pensadon.

La fokuso de miaj studoj estis la fako praktika teologio. Sed mi havis larĝajn interesojn kaj laboris en diversaj aliaj studfakoj. Pro miaj super-averaĝaj notoj en ĉiuj teologiaj fakoj mi ricevis stipendion. Do mi financis miajn studojn sole per stipendioj kaj laborpostenoj, sen pruntoj aŭ studenta financado. Tial mi mallongigis la studojn je unu jaro kaj finis ilin en dek semestroj, malgraŭ la tri lingvoj (la latina, la greka kaj la hebrea).

Kaj mi volontulis en la studenta konsiliaro kaj en la fakultato. Mi serĉis ŝancojn por pli bone koni la akademian vivon kaj la sciencan komunumon.

Ĉio nur, ĉar eta spiro de vento ŝanĝis mian vivon. Hodiaŭ mi estas pastrino en protestanta eklezio, kun profunda fido al Dio kaj speciala ligo al la Sankta Spirito. Mi vivas en la sekureco de la fido ke la Ruaĥ resonas, ĉe vi kaj mi. Ĉiutage. Al tio mi firme kredas. Amen!

# Ni kantas laŭte

Ni laŭdas Dion kune ni.
Ni kantas laŭte ne nur mi.
Ni dankas Dion, ankaŭ vi.

Ni volas kanti kune.
Komencu spiri zume.
Plenigu korojn per la ĝoj'.

Ni eĉ lamentas kune ni.
Ni petas Dion, helpu nin!
Ni preĝas kaj petegas ni.

Ni volas kanti kune.
Komencu spiri zume.
Plenigu korojn per la ĝoj'.

Funebras ni, konsolu nin!
Suferas ni, protektu nin!
Je Dio firme kredas ni.

Ni volas kanti kune.
Komencu flustri zume.
Plenigu korojn per la ĝoj'.

Kio okazas, kiam ni kantas tiel? La teksto memorigas nin pri preĝo. Ĝi komenciĝas per laŭdo kaj enhavas dezirojn, kiujn ni alportas antaŭ Dio. Samtempe ĝi ankaŭ montras, ke ni estas plenaj de fido kaj dankemo.

Similaj preĝoj estas parolitaj kaj kantitaj milfoje de homoj ĉie en mondo. Multaj kredas ke Dio vere aŭdas ilin. Sed kompreneble ne ekzistas pruvo por tio.

La nura certa afero estas ke ni preĝas kaj kantas kune. Tio estas la konfirmo, ke ni ne estas solaj kun niaj deziroj. Muziko ankaŭ ludas gravan rolon. Ĝi transportas nin al alia nivelo, almenaŭ por la tempo, kiam ni kune kantas. Ni tiam liberiĝas de ni mem kaj povas malfermi nin.

Ni malfermas nin al la ideo, ke la distanco inter ni kaj nia Kreanto fariĝis iomete malgranda.

# Kion vi respondus?

Kial multaj kristanoj ne parolas pri sia kredo?

**Respondo de ChatGPT**

Estas pluraj kialoj, kial multaj kristanoj ne parolas malkaŝe pri sia kredo:

Persona sinretemo

Multaj homoj konsideras sian kredon privata afero kaj ne sentas sin komforte paroli pri ĝi publike.

Timo de malakcepto aŭ konflikto

En laikaj aŭ miksitaj religiaj socioj, paroli malkaŝe pri fido povas konduki al diskutoj aŭ eĉ konfliktoj. Kelkaj homoj volas eviti tiajn situaciojn.

Humileco kaj modesteco

Kelkaj kristanoj kredas ke kredo devus esti pruvita per agoj prefere ol per vortoj. Ili ne volas doni la impreson, ke ili levas sin super aliaj.

Necerteco aŭ dubo

Kelkaj homoj sentas, ke ili ne estas bone informitaj aŭ havas demandojn pri sia kredo kaj tial evitas diskuti pri ĝi.

Socia premo

En kelkaj kulturoj aŭ sociaj rondoj, religio estas konsiderata malmoda aŭ posttempa, do kredantoj timas esti mokataj aŭ ne prenitaj grave.

Pasintaj spertoj

Tiuj, kiuj havis malbonajn spertojn kun malakcepto aŭ negativaj reagoj, fariĝas pli singardaj pri kundivido de siaj kredoj.

Manko de kutimo

Multaj kristanoj neniam lernis paroli malkaŝe pri sia kredo ĉar ĝi ne estis kutima en sia familio aŭ preĝejo.

# Kolofono

**Titolo**
„Por mi, tio estis interveno de Dio“

**Originala titolo**
„Für mich war das ein Eingreifen Gottes“

**Versio 1.0**
1-a Eldono, 2025, E-libro

**Aŭtoro**
Erik Tantal, alinome Klaus Friese

**Traduko**
Klaus Friese

**Kopirajto**
© Klaus Friese,  Hamburg

**Retpoŝto**
friese@esperanto-hamburg.de

**Hejmpaĝo**
esperanto-klaus.de

**Kovrilo**
Erik Tantal

